

# *Kajeroj el la Sudo*

*Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj*

<http://www.gazetotekolanti.com/kajeroj/k87.html>



*Kien iras HEF?*

*Vivu la Respubliko!*

## *Amiko Alfredo*

*Nº 87*

*Oktobron - decembron de 2011*

## Redaktore

## Kaj denove oni petos nin aliĝi al sia

**L**astnumere mi petis vin, leganto ne voĉdoni en tiu cirka montro, kiun oni faros la venontan 20-an de novembro.

**A**nkaŭ oni devas memori, ke tiun daton mortis unue, dum la Hispana Intercivitana Milito, Jozefo Antono Primo de Ribera, filo de la unua Diktatoro de Hispanio dum la dudeka jarcento, kaj preskaŭ kvar dek jarojn poste mortis la dua diktatoro de tiu jarcento, Francisko Franko Bahamonde, je la sama dato.

**D**aŭra **propagando** de ekstremmaldekstra partio PSOE dum dudek unu jaroj, unue sub regado de Felipe Gonzalez Marquez kaj post okjara intermezo, sub tiu de Jozefo Ludoviko Rodriguez Zapatero sukcesis konvinki multajn hispanojn pri tio, ke **maldekstro estas bona per si mem, kaj dekstro estas diablo.**

**E**stas nelogike, tamen, ke hispanoj voĉdonis por ili denove je 2008, eĉ se ili, socialistoj, posedas la amaskomunikilojn. Mensogo post mensogo tago post tago konvinkas homojn kun neperfekta edukado, tiu provizita de LOGSE, pri tio, ke dekstro estas diablo kaj maldekstro estas zorgas pri la popolo, **malgraŭ la terure malbona ruinigo de la tuta socio kaj nacio** hispana fare de socialistoj.

**M**ontru mi kiel ekzemplo, ke la rezultoj de la reporto Pisa diras, jaro post jaro, ke la sukceso de niaj gelernejoj estas inter la tri plej malbonaj en Eŭropo. Antaŭ 1975 ĝi estis inter la unuaj en la mondo...

**O**mbroj kaj ruiniĝo aperas en nia horizonto, se ni ne sukcesas **forpreni tiujn homojn el nia politika** sistemo.

**K**iujn, tamen, ni voĉdonu? Ĉu tiun partion, kiu faris la Leĝon pri Minoraĝuloj, **PP? Ne, mi ne fidas ilin**, ĉar ĝi estis komplica pri LOGSE, kiun ili ne forigis, kaj ankaŭ la Leĝon pri Mistraktado ili ankoraŭ ne diris, ke ili forigos, eĉ se ili konsentas, ke ĝi estas maljusta kaj kontraŭkonstitucia.

**R**ara partio estus tiu, kiu pretus malplialtiĝi la salajrojn de la deputitoj mem. **Tiun mi voĉdonus.**

**A**ntaŭ voĉdoni, oni pensu ĉu oni **afidas** la voĉdonatan partion.

**T**io estu manĝado por via penso, se vi intencas tion fari.

**I**am popolo diros al deputitoj, per sia amasa **nevoĉdono, ke ni zorgas pri ili same kiel ili zorgas pri ni.**

**O**ni diras, ke ne voĉdoni estas nedemokrata. Sed **demokrato povas voĉdoni nur demokraton.**

## Parolas la prezidanto Kapitalismo

Estimataj gehaleanoj!

La kapitalisma sistemo



rabas, jes rabas la laboristojn kaj ankaŭ la civilan societanojn sed ili, la estraro de la kapitalismo mem,

gajnas multe da mono.

Kaj la laboristoj devas labori pli kaj pli kaj suferas la sekvojn de la riĉuloj.

La sindikatoj ne parolas laŭte, nur mallaŭte. Kiun ili reprezentas?

Sed la juneco, jes la juneco, parolas pli laŭte kiam ili okupas la stratojn, la parkojn, kaj la grandaj avenuoj.

Ili estas nian estonteco, ili estas la estonteco de la laboristoj en Francio, Belgio, Britio, Australio.

Mi gratulas islandanojn, ĉar ili estas tre dankotaj personoj kiam ili povis venki

kapitalismon.

Ili venkis kaj la kapitalistoj forlasis la insulo kaj ankaŭ eniris malliberejon.

Mi duoble gratulas islandanojn ĉar ili metis kapitalistojn en la prizanon.

Kaj ni ne venkis pro tio ni devas labori pli por malpli. Tia estas la kapitalismo.

Kaj tio povas okazi nur en maldemokratia sistemo fondita antaŭ kelkaj jaroj de Felipe González kaj lia vicprezidanto, Alfonso Guerra, kiu singratulis pro tio, ke Montesquieu mortis, tio estas, ke lia doktrino pri apartigo inter juĝarto, leĝofarado kaj regado sendependaj unu el la aliaj, oni sukcesis nuligi. Sed demokrataj civitanoj povas diri nur: For Alfonso Guerra! Vivu Montesquieu!

**Juan Antonio  
Cabezas Martinez**

# Amiko Alfredo

**A**ntaŭ kelkaj jaroj estis sciencisto kaj disvastigisto pri scienco, **Felikso Rodríguez de la Fuente**, kiu mortis akcidente kaj oni sopiris al li per kanto **Amiko Félix**, kiun kantis infanoj, ĉar li multe faris pri ili kaj pri aliaj hispanoj, ĉar li interesigis nin pri scienco.

Li ja estis bonulo. Pro tio mi ne povis ne pensi pri li kiam mi vidis en televido, ke S-ro Alfredo Pérez Rubalcaba deziras alproksimiĝi al voĉdonantaro, supozeble la popolo, dirante, ke oni ne nomu lin *Rubalcaba*, sed **Alfredo**. Sed kiu estas tiu Alfredo?

Alfredo Pérez Rubalcaba estas doktoro pri Ĥemiaj Sciencoj, kiu studis kaj gajnis postenon kiel instruiston en Universitato Komplutense de Madrido, kaj ankaŭ instruis en Germanio kaj en Francio, universitatoj de Konstanzo kaj Montpeljero, antaŭ ol li ekdediĉis sin al politiko.

Tio okazis je 1982, kiam Felipe González Márquez venkis la balotadon je 1982. Li tiam estis **Ministro pri Edukado**, kaj poste iĝis **Ministro pri Prezidenteco** kaj **Pri Rilatoj kun Parlamento**. Oni suspektis ĉiam pri lia gvidado de la skandala agado de **GAL**, kontraŭterorisma terorista grupo da krimuloj rikoltita inter policianoj, sed neniam



oni pruvis ion ajn kontraŭ li aŭ la Prezidanto mem. Oni memoru, ke Ministro Barrionuevo kaj Ĝenerala Sekretario Rafael Vera estis enkarcerigitaj pro tiuj krimoj. Kiam Jozefo Ludoviko Rodríguez Zapatero kandidatiĝis, je 2004, li organizis kaj zorgis pri ties politika kampanjo, sukcese, ĉar Zapatero iĝis prezidanto de Hispanio. Kvankam dekomence li iĝis nur **voĉ-portulo de la Grupo Socialista** en la Hispana Parlamento, je la 11a de aprilo de 2006 li iĝas **Ministro de l' Interno**, kie li gvidis la malkreskigon de la nombro de trafikakcidentoj kaj lukton kontraŭterorisman, kvankam oni ne multe laŭdas lian agadon pro tio, ofte kritikata kiel tro aŭtoritatismaj leĝoj, kiuj enkondukis la sistemon pri punktoj en stirpermesilon, kaj ankaŭ oni kulpis lin pri la **skandalo de l' trinkejo Fajsan'**, kiu rezultis kiam policano avertis grupon de teroristoj, kiuj estis en tiu trinkejo, ke aliaj policianoj estas tuj arestontaj ilin. La teroristoj foriris ĝustatempe, kaj



kelkajn semajnojn poste ili faris atencon en flughaveno de Madrido, en kiu mortis du homoj. Tamen la interveno de la Ministro ankoraŭ ne estas pruvita.

Kiam la **Ministrino pri Defendo**, Karmen Čakon', estis graveda, **li anstataŭis ŝin** pri ŝiaj devoj dum unu monato, de majo al junio de 2008, kaj je la 21<sup>a</sup> de oktobro de 2010 li iĝis **Vicprezidanto Unua kaj Ministro Voĉportanta de l' Registaro** sen lasi sian ministerion pri l' Interno. La 27<sup>a</sup> de majo de 2011 lia partio, PSOE, elektis lin kiel kandidaton por la venonta balotado, sed nur la 8-an de julio li rezignis pri siaj postenoj en la registaro. La Ministrino pri Defendo ankau volis kandidatiĝi por la Prezidenteco de la Registaro de Hispanio, sed verŝajne oni konvinkis ŝin rezigni pri sia peto pri Primaraj Voĉdonoj (kaŭkuzaj, usondirite).

Nun ŝajnas, ke li deziras aperi kiel novalveninto en la politikan vivon de Hispanio, laŭ tio, kion li diras. Li surprizis nin antaŭ nelonge per parolado per kiu li diris al ni, ke **li scias kion fari por krei laborpostenojn, kaj por eliri la krizon**, kiu tiom kruela estis en Hispanio al gelaboristoj. La vivokosto plialtiĝis pli ol iam antaŭe, sed li, laŭ lia diro, scias tion, kion oni faru por eliri la krizon. Oni sindemandis publike, kial li ne diris tion antaŭe. Ekzemple, kiam lia estro, Prezidanto **Zapatero**, diris, ke **la krizo ne ekzistas**, ke paroli pri krizo estas iĝi malpatrioto, kaj ke **Hispanio estas en la Campiona Ligo pri Ekonomio**

**en la mondo**. Oni miras, ke **li ne tiam diris** al nia plej alta responsulo pri tio, kio okazas.

Li diras, ankau, ke oni devas apliki altan impoŝton al riĉuloj, por ke ili kunlaboru eliri la krizon. Tiel farante, li klarigas, oni ekhavos mil milionojn da eŭrojn. Sed lia estro atingis nenion per dektrifoje tiu kvanto, kiun li dediĉis al **Plano E**. Kial li ne konsilis al ZP tiam ion pri sia magia recepto? Tamen, plialtigi impoŝton ne multe helpas plialtigi la laborpostenojn, ĉar hodiaŭ ne estas malfacile forpreni sian monon en aliajn landojn de la Eŭropa Komunumo cele al investo, se oni ne allogas ilin investi ĝin ĉi tie. Kaj taksi monon, kiu jam pagis impoŝton estas nejusta kaj maliluziiga ŝpari monon. Suferos pro tio multe pli ne tiom riĉaj mezklasuloj, kiuj deziras nur ŝpari monon por maljuneco. Ĉar elspezita mono ne pagas. Aliflanke, li ankau ne konsilis al sia ĵusestro pri **mehanismo detekti laboristan perforton**, kiel ekzemple la situacion de multaj gelaboristoj, kiujn oni dungis por duonlabortago, sed tamen oni devigas fari tutan labortagon, kaj ankau aliaj, kies labortago entutas 14 horojn aŭ pli. Ili ne kuraĝas denonci tion, ĉar ili timas perdi sian postenon. Li tion scias certe, ĉar li estis la plej longdaŭra ministro pri l' interno en la historio de Hispanio kaj laŭ siadire, li **konas ĉion kaj ĉiujn en Hispanio**.

Antaŭ kelkaj tagoj teroristoj de ETA diris, ke ili ne plu mortigos, kaj atente atendas la registarojn de Hispanio kaj Francio diskuti kaj negoci paco-

procedon. Amiko Alfredo komentis pri tio, ke **nun komencas periodon pacan en Hispanio, ĉar demokratio venkis terorismen.** Sed mi ne vidis, ke teroristoj estas en karceroj senarmigitaj kaj arestitaj de polico, sed nur ke ili mem, propravole, deziras ne plu uzi armilojn, kiujn ili ne rezignas. Mi dubas, ĉu La Kandidato socialisma eraras, ĉu li rekte primokas la loĝantaron de Hispanio.

Ankaŭ li parolas pri tio, kion oni devas fari, sed ne kiel li farus tion, se li venkus la balotadon. Sed rigardante tion, kion la registaro kies vicprezidanto li estis, faris aferojn, oni povas dubi, eĉ timi, pri la procedoj. Ekzemple, pri **subvencioj li diris eĉ ne unu vorton.** Antaŭ du tagoj ministrino Lejre Pahin' disdonis pli ol 200 000 eŭrojn por neregistara organizo (NRO) prezidita de la edzino de S-ro Rubalkaba mem. Ankaŭ aliaj grandaj kvantoj sinsekve **iras al minoritataj asocioj, kiel tiuj de Lesboj kaj Gejoj,** en tiuj ĉi tempoj de krizo ekonomia, dum ne estas mono por kuraciloj de sansistemo en kelkaj partoj de Hispanio. Ŝajnas ke al socialistoj gravas multe pli ideologio kaj ties disvastigo ol ekonomio de ĉiuj hispanoj.

Sed Sinjoro Rubalkaba ankoraŭ ne diris eĉ unu vorton pri tio, kion li faros por **malapartigi la diversajn partojn de la popolo.** Kiam tio, kion oni interkonsentis nomi **demokratio** venis en Hispanion je la lastaj sepdekaj jaroj, la popolo jam ne plu memoris pri nia terura intercivitana

milito. Fakte, la plej granda parto da hispanoj eĉ ne konis ĝin. Sed la Registaro socialisma faris la **Leĝon pri Memoro Historia,** per kiu malnovaj vundoj venis denove inter hispanojn: preskaŭ ĉiu familio havas murditajn el alia flanko dum la milito, kaj iliaj kadavroj tre ofte neniam aperis. Nun oni eltombigas multajn ostojn, kaj kulpigas "la alian



flankon" pro ties murdojn, sed ofte okazas, ke la ostoj ne apartenas al tiuj, kiujn oni celas diri, sed al aliflankanoj, kreante tiel malbonajn sentojn tie, kie la konflikto jam estis solvita. Ŝajnas, ke oni deziras venki la venkintojn sepdek jarojn poste. Oni neniam devus atenti al tiu leĝo, kaj **oni neniam devus krei tiun leĝon,** kies utilo certigas nur novan apartigon inter gehispanoj. Sed Kandidato Rubalkaba ankoraŭ diris nenion pri tio, ĉu li intencas malaperigi tiun nekonvenan leĝon.

**La Movado 15M,** kiu aperis tuj preskaŭ la balotado municipan kaj aŭtonomaj okazintaj la 22an de majo, protestis kontraŭ multe da aferoj, kiujn mi ankaŭ priprotestas. Deko-

mence ili pravas. Sed ili tute ne pravas laŭ la rimedoj, kiujn ili uzas. Ili okupis publikan spacon perforte kaj kriac̃e. Sed **tiutempa Ministro pri l' Interno**, kaj sekve estro de la polico en la tuta nacio, S-ro Alfredo Pérez Rubalkaba, faris nenion pri ĝi. Rezulte, multe da komercistoj perdis monon kaj civitanoj de Madrido kaj aliaj urboj ne povis libere promeni tie, ĉar la placon okupis tendaro da protestuloj. Mi ne povas ne pensi, ke **ĉio validas, se konvenas al ministro**, kaj tio eble donas al ni ideo pri tio, kio okazos, se S-ro Pérez Rubalkaba estas nia nova Premiero.

Kaj finfine **ni parolu pri la familio**: ĉu kandidato Pérez Rubalkaba kreas leĝojn, kiuj protektos familion? Nun en tiu ĉi krizo, familio estas solvo por miliono da homoj, kies familianoj estas maldungaj. Ili subtenas sin dramatike nur danke al helpo de geavoj kaj proksimaj familianoj. La ŝtato faras nenion por maldungitoj. Tamen, ne estas sociala danĝero nun en Hispanio ĉar familio apogas ilin, kaj ankaŭ pro tio, ke **Jesuo Forlasita** (religia, katolika asocio), disdonas manĝadon senpagan. Ĉu Kandidato Pérez Rubalkaba provizos ion, por ke en tiuj situacioj **nek familio nek religio devos** provizi, sed la ŝtato, kiel estas ĝia devo? Laŭ la regado de José Luis Rodríguez Zapatero ni vidis kelkajn leĝojn, kiuj atencas kontraŭ familio rekte kaj nerekte: **Leĝo pri divorco** (oni povas divorciĝi en Hispanio en nur tri monatoj, laŭ la deziro de nur unu el la geedzoj, sen ekzisto de objektiva kialo, eĉ kaprice, senrigarde al la sekvoj por geinfanoj aŭ al alia parano); dekseksjarulino povas **aborti** sen kono de ŝiaj gepatroj; gesamseksemuloj povas adopti geinfanojn, eĉ se ili

bezonas referencon pri ambaŭ seksoj, forgesante, ke ne la bonon de la gepatroj, sed tiun de la geinfanojn oni devas prizorgi... Kaj ili eĉ celis krei novan leĝon pri **Morto Digna**, kiu ebligis familianojn decidi fruiĝi la morton de maljunuloj kun malbona sano. Sed samtempe oni disdonas milionajn subvenciojn al hispana kinarto kaj aliaj homaj agadoj proksimaj al ideologio de socialisma partio dum oni havas la plej malaltajn helpojn al familio pro nasko da bebo en la tuta Eŭropo. *Ŝajnas, ke kinarto gravas pli ol familio.* **Ĉu Kandidato Pérez Rubalkaba denove apogos familion** per subvencio al novnaskito, al aĉetado da libroj por deviga edukado, por alproksimigi la universitaton al tiuj, kiuj ne havas la teruran kvanton da mono, kiun oni postulas por eniri tiun studnivelon?

Sufiĉe da demandoj mi prezentas nun ĉi tie. Mi timas miajn proprajn respondojn, kaj pro tio mi ne prezentas ilin antaŭ vi, leganto. Sed mi invitas vin cerbumi pri ili, kaj respondi al vi mem antaŭ ol vi decidis al kiu kandidato vi premios per via fido. Kaj ankaŭ al kiu politika partio vi donacos monon, ĉies monon, per via voĉdono.



# Al Marjano, kun inklino

Ĉu vi, Sinjoro Raĥoj, vere celas la plibonfartigon de niaj kuncivitanoj, ĉu nur tiun de kelkaj kontraŭ tiuj de la aliaj?

Unu grava plendo pri la partio, kiun vi prezidas, Sinjoro, nomumita Popola Partio, tio estas, la partio de la popolo, estas, ke kiam ĝi ŝajnis regi por la plibonfarto de la popolo, ĝi ne kuraĝis fari ĝin tre bone:

La LOGSE-on vi ne nuligis kiam vi estis en povo. Vi mem, Sinjoro, estis Ministro pri Edukado. Kio okazis? Ĉu oni **malebligis** tion al vi, aŭ vi simple **ne atentis** al tio?

Antaŭ peti la voĉdonon, mia respektinda Sinjoro, vi devas promesi aferojn, kiujn vi faros favore al popolo.

La agojn, kiujn via pasinta registaro popola faris, la sekvinta registaro senhezite nuligis la unuajn tagojn de sia regado. Kial vi ne povis fari same?

Estas kelkaj ŝuldoj de PP al komuna hispano, kaj mi ne vidas, ke vi diras, ke vi pagos, sinjoro.

Ĝuste tiuj leĝoj, kiuj tuŝas rekte Ginfanojn kaj virinojn estas plej maljustaj. Ĉu vi korektos tion?

Orajn promesojn havas ĉiuj kandidatoj, sed poste registaroj forgesas pri ili. Pro tio mi ne fidas ilin.

Se vi sukcesas iluziigi civitanojn, sinjoro, pri tio, ke viaj proponoj estas veraj kaj farotaj, mi voĉdonos por vi.

Estas, tamen, multe da aferoj, kiuj malargumentigas tiun senton.

Ne estas paco nun en Hispanio, sinjoro kandidato, pro maljusteco.

Cele al korektado de tio, kion vi faros, sinjoro?

Antaŭ kelkaj jaroj mi fidis vin, gesinjoroj deputitoj hispanaj dekstraj.

Sed ne, mi kredas, ke mi ankaŭ ne voĉdonos al vi. **Fi al tiuj, kies pensio duobligas** la maksimuman pension en Hispanio, politikistoj!

Ĉu kredi pri **mirakloj**? **Ne dankon.** Ankoraŭ deputitoj ne reinseriĝis en socio, laŭŝajne.

Unu respondon post la aliaj mi atendas de vi, sinjoro kandidato, antaŭ ol mi konvinkiĝas pri tio, ke vi meritas mian voĉdonon. Dume, plej bona voĉdono estas ne ekzistanta voĉdono.

Jesuo



# Vivu la Respubliko!

## 2 La Filino de Johano Simon'...

**K**vin jaroj antaŭe La Soldato estis studante je universitato. "Se vi studas, morgaŭ vi ne estos malsatmortulo", dicitis al li sia patro. Kaj li studis. Multe. Sed li ne povis iĝi arĥitekto, kiel lia patro volis. Li ne estis taŭga por tio. Li iĝis instruisto. Neniu volis esti instruisto tiam. Oni donis al li lernejon en vilaĝo kun kvin cent enloĝantoj. Poste li sukcesis pri ekzameno por gajni postenon. Estis neniu pli, do oni donis ĝin al li. Kaj ili eĉ dankis lin, ĉar neniu pli volis la postenon.

Panjoj estis ekstreme ĝojaj pro tio. Tutan instruiston ili havis por siaj geinfanoj. Deksep jaraĝa instruisto. Tiu estis alia jarcento. Alia mondo. Alia lando.

En ĉefurbo homoj ludis alian aferon. Dum La Soldato lernigis la geinfanojn legi kaj skribi, homoj en la ĉefurbo dediĉis siajn strebojn kriaĉi malbelajn aferojn al La Maljunulo. Sed tagon oni vokis La Soldaton "servi la patrimon". Kvazaŭ li ne servis al ĝi de tri jaroj antaŭe. Sed ne gravas. Plaĉas al li lerni aferojn.

Tial li diris al knabino, ke ili geedziĝos tuj kiam li revenos el "la servado". Ŝi adiaŭis kun larmoj en okuloj ĉe la stacidomo. Ŝi timis, ke

ili ne renkontos denove. Kaj ŝi pravis. Sed ne La Soldato kulpiĝis. Estis ŝi tiu, kiu ne atendis lin. Ŝi akiris strangan malsanon kaj mortis. Kompatinda soldato. Oni ne permesis al li eliri la kazernon veni entombigi ŝin. Li ne estas parenco, oni diris al li.

Kiam li finis la servadon, du jarojn poste, li vizitis ŝin en cimiterio. Sur ŝtono estis resumo de ŝia vivo: nomo kaj du nombroj, tiu de ŝia naskiĝtago, kaj tiu de ŝia mortiĝtago. Neniu pri tio, kio okazis inter ambaŭ. Ekzemple tiu nombro, kiun li memoris inter ili du. La tagon de la pajlejo. Ŝi estis lia tiam. Kiam ili ĵuris amon eternan unu la alian. Aŭ almenaŭ ĝis morto apartigu ilin. Bedaŭrinde morto venis antaŭ li. Ne estas juste. Eble pro tio ĝi ne venis al kazerno. La morto. Ĝi estis tro okupata laborante pri homoj decaj, anstataŭ veni por tiuj kunplotantoj, judoj, masonoj, merdokornutoj.

Sed homoj diris, ke ili volis landon kiu apartenos al ĉiuj. Kaj ili ne haltis ĝis kiam ili kunvokis referendumon. Ili estis demandaĵaj ĉu ili volis respublikon ĉu monarĥion. Li mem prifajfis pri ambaŭ aferoj. Sed li informis sin. Monarĥio estas sistemo en kiu regas nur unu ĉar Dio volas. Kaj tio estas tio, kio estas en La Testamento de La Maljunulo. Multaj voĉdonis kontraŭ tio por ĝeni La Maljunulon. Sed li ne plu sciis pri tio, ĉar li estis mortinta. La

Respubliko, male, signifas ke ĉiuj regas. "Ĥaoso", li diris al si. "Tio estas kvazaŭ miaj geinfanoj decidus tion, kion oni devas fari en nia klasĉambro, sed ĉiu diversan aferon kaj samtempe al la decido de aliaj". Sed bone, li pensis ke la afero povus esti amuza. Do li iris voĉdoni.

Kaj li voĉdonis por tiu afero nova. Respubliko. Li estis leginta la filozofon grekan, kiu parolis pri tio antaŭ multe da jaroj. Ĝi povus esti distra.

Poste oni devis iri voĉdoni denove. Diversaj gravaj individuoj prezentis sin al posteno simila al tiu de reĝo, kiun oni nomis Prezidanto de la Respubliko, sed kiu ne daŭrigus la tutan vivon. Kvar aŭ kvin jaroj, al kiu gravas? Li demandis pri tio al patro de amiko sia, kiu komprenis multe pri tiuj aferoj. Tiu sinjoro diris, ke li voĉdonu la plej maljunan, ĉar li publikigis multajn librojn per kiuj li diris tion, kion li farus, se li venkus, kaj li opinias, ke estas granda senco en tio, kion li diris.

Sed la afero ne finis tie: oni vokis lin voĉdoni denove. "Ho, kiom gravaj ni estas", li diris al amiko. "Nin jam vokis tri fojojn voĉdoni".

Kaj li ankaŭ demandis sian amikon: "Kaj nun kiun mi voĉdonu?"

"Vidu", respondis li, "estas tri listoj kun nomoj. Ĉu vi konas iun ajn el ili?"

"Nu, ne. Ĉu mi devus?"

"Ne vere, sed vi devintus informiĝi pri ili. Ili ĉiuj diris per radio kaj televido pri tio, kion ili estas farontaj, se ilin oni elektas. Kaj en kunvenoj,

kiujn li faris kun homoj, post laborhoroj, ili ankaŭ parolis pri tio".

"Ho Vidu, amiko: pro tio, ke mi ne iris aŭ spektis ilin, mi ne povas voĉdoni. La venontan fojon mi iros vidi ĉiun kandidaton, laŭ miaj ebloj. Kaj se iu konvinkas min, mi voĉdonos por li aŭ ŝi. Se ne, mi fidus vin, kiuj komprenas pri tio, kaj certe voĉdonos por la plej bonaj".

Kaj la instruisto iris en sian klasĉambron, ĝis oni vokos lin denove por voĉdoni.

Sed tiuj, kiuj venis en povon, malplialtigis lian salajron. "Ho, diable, bone ke mi ne voĉdonis por ili", diris li. "Kun La Maljunulo mi gajnis pli da mono".

Kaj oni nomumis inspektoron, kiu venis inspekti kaj kontroli tion, kion la instruisto faris. En sia lernejo. "Mi instruas ilin legi kaj skribi, inspektoro. Kion pli vi deziras, ke mi faru?"

"Ne sufiĉas", diris inspektoro por justigi sian salajron. "Vi devas vekti en ili la valorojn kiuj promocias la senson demokratian".

"Kaj kio estas tio?"

"Paroli al geinfanoj pri la lando, kiun ni volas por ĉiuj".

"Tio estas malfacila. Ĉiu ajn volas sian propran landon diversan".

"Oni ne povas esti tiom malsolidara kiel vi estas. Vi havas en viaj manoj la estonton de la lando. Ne difektu ĝin", diris la inspektoro.

"Do venu vi en mian klason kaj lernigu min kiel oni faru tion".

Sed la inspektoro ne venis. Li faris informojn, konsilis preni mezurojn, li kritikis lian metodojn, kaj rekomendis, ke oni anstataŭu la instruiston. Sed ili ne faris tion. Neniu pli volis iri al tiu vilaĝo. Progreso forgesis pri La Soldato, kiu estis instruisto.

Pro tio liaj geinfanoj lernis legi kaj skribi. Perfekte. Ĉiuj. Kaj pensi per si mem.

Kiam ili scipovis bone legi, La Soldato prenis librojn el Regiona Biblioteko. Li atingis interkonsenton kun la direktoro de tiu biblioteko per kiu li ricevis multajn librojn dum tuta monato. Ĉiu infano devis legi unu libron ĉiun semajnon. Poste ili devis komenti la libron. Kaj li igis ilin verki rezumon kritikan kun komentario pri libroj po unu. “Endas kritiki tion, kion ni vidas, ĉar se ni konsentas kun ĉio, ni povas plibonigi nenion”, diris La Soldato al siaj disĉiploj. Kaj ili legis Julion Verneon. Kaj Emilon Salgarion. Kaj Fransiskon de Kevedo. Kaj Lopeon de Vega. Kaj la grandan Vilhelmon Ŝekspiron. Kaj la alian gravan Vilhelmon, Tennessee Williams. Kaj ili lernis multe. Sed ili sciis nenion pri formado pri la nacia spirito de la tempo posta al La Maljunulo. La instruisto ne ŝatis tion, kion siaj instruistoj lernigis lin kiam li estis malgranda. Sed la revizion de respublikuloj li ŝatis eĉ malpli. Nek Dio nek Sendio: oni devas havi referencon pri tio, kio estas bona kaj kio estas malbona. Same

kiel jam diris S-ro Fiodor Dostojevski per tiu noveleto, **Murdo kaj puno**. Aŭ S-ro Tirso de Molino per tiu teatraĵeto, **Kondamnata pro malfidanta**. Jes, li estas troglodita instruisto. Kaj kiu zorgas? Sed liaj infanoj neniam, neniam, kiam ili estis plenkreskuloj, pikis la okulojn al neniu pro tio, ke ili pensas diversmaniere.

Bedaŭrindas la fakto, ke en la cetera parto de la lando La Soldato ne instruis. Aliajn aferojn lernigadis aliaj instruistoj. Pli da viktimoj de inspektoroj. Ĉar al urboj ja volis iri la novaj instruistoj. Tiuj, kiuj vendas sin po plado da lentoj. Tio estas, pro posteno por ne instrui ion profiteblan, sed tion, kiel oni solvos la problemojn, kiujn oni ne havas.

Kaj baldaŭ instaliĝis la unika penso en la socio. Escepte de tiu perdita vilaĝo en la kamparo. Kie neniu volis iri instrui.



# Kien iras HEF?

**M**i ĵus ricevis la lastan bultenon de la Hispana Esperanto Federacio, en kiu mi legis interesan artikolon de Miguel Gutiérrez Adúriz, akk (ankaŭ konata kiel) Liven Dek, pri la nuna situacio de nia federacio esperanta. Ankaŭ mi parolis pri tio dum la lasta kongreso universala, en Danio, kun diversaj samideanoj. Ankaŭ dum la **Semajno pri Kulturo kaj Turismo** de Katalunio mi prikomentis tiun zorgon komunan de multaj hispanaj geesperantistoj. Sed mi ne vidas solvon. Mi klarigas kial.

De la lasta kongreso hispana en Mursjo, en Sankta Havjero, je 2001, mi ne sekvis la hazardojn de nia federacio tre atente, interalie pro la ideologia inklino de ties estraroj. Antaŭ kelkaj jaroj, dum la Universala Kongreso de Valensjo, je 1993, mi demandis al nova estraro pri sia programo. Verŝajne ili ne havis, sed Liven Dek deklaris koncize tre belan intencdeklaracion, kiun mi vere dankis. Ne sufiĉas esti la sola kandidato por ne havi programon. Eble mia demando publika estis interpretita kiel atako, kvankam ĝi vere ne estis tia. En posta kongreso denove en Valensjo, dek jarojn poste, mi konstatis rektan malinklinon al mi kaj aliaj amikoj de Mursjo, kaj pro la malbona etoso mi decidis ne reiri al



kongresoj de HEF, eĉ se mi ne malaliĝis la asocion, ĉar evidentiĝas al mi, ke devas esti ia ajn asocio de Esperanto en Hispanio, eĉ se ĝia agado ne estas ekzakte defendebla laŭ miaj honestaj konsideroj. Mi ne intencis kandidatiĝi al ia ajn posteno en tiu federacio, kaj ankaŭ mi ne intencas. Mia laboro por Esperanto estas konata de ĉiuj, kaj mi estas tre komforta kiel redaktoro de ĉi tiu bulteno de HALE de pli ol 15 jaroj, kaj mi vere ne sopiras al pli granda kompromiso kun nia ideo, krom esti la iniciatinto kaj entreprenanto de la **Gazetoteko Lanti**.

Sed samideanoj en Kopenhago anoncis al mi, ke la du lastaj Prezidintoj de HEF devis forlasi sian postenon pro personaj kialoj, kaj la nuna prezidanto, Tonjo del Barrio, oficas nur provizore dum unu jaro, kaj sekve endas trovi novan prezidanton. Demandite ĉu mi deziras esti prezidanto, mi ekneis la eblecon, eĉ se pro tiu rifuzo mia la federacio malaperos.

Ververe la lastajn jarojn HEF ne marŝis tiel, kiel esperanta, neŭtrala asocio devus marŝi, ĉar en ĝia sino aperis ideologio neneŭtrala, aperante la nomo **Esperanto** kadre de maldekstraj budoj en **foiro komunisma**, ekzemple. Ankaŭ estas dissendolistoj en Esperanto, kie estis **skandala spektaklo pro insultoj** al aliaj esperantistoj, kiuj ne pensas same kiel postaj estraranoj



de HEF. Eĉ mi mem estis rifuzita membrecon en dissendolistoj, kiel **iberia-esperantistaro**, kie mi provis eniri nur por konstati ĉu ili vere rifuzus min, ĉar vere mi havas nenion komunan kun ties anoj, krom Esperanton. **Nenion pli**, laŭ ili. **Nenion malpli**, laŭ mi. Tio estas grava leciono, kiun ĵusaj estraranoj de HEF ankoraŭ devas lerni. Ni estas malmultaj, kaj pro tio ni ne povas permesi al ni senĉesajn kaj sensencajn disputojn pri eksteraj aferoj, kiuj estas multe malpli gravaj ol Esperanto. Politiko, ekzemple.

Ĉu mi ĝojas pri tio, ke HEF havas problemojn? Kompreneble, tute ne. Nia ideo komuna estas multe pli grava ol niaj malkomunaj ideoj. Almenaŭ laŭ mi. Mi povus labori kune kun ĉia ajn homo favore al Esperanto. Sed mi ne certas pri la sinteno de aliaj homoj, kiujn mi konas, eĉ se supraĵe.

Sed estas multaj bonaj esperantistoj en Hispanio. Ili eble faras gravan kaj grandan laboron por subteni sin. Sed ili povas, eble, dediĉi iom da sia tempo al nia ideo kaj preni la torĉon, kiun **Tonjo del Barrio** deziras lasi. Mi povas pensi pri **Liven Dek** mem, aŭ **Georgo Kamaĉo**, **Miguel Fernandes**, **Abel Montagut**, kaj kelkaj aliaj. Ili bone kaj belstile verkas en Esperanto. Ili povas redoni ion al ĝi.

Rigardante al mi mem, mi ne konsilus proponi al mi, ĉar interalie mi havas tre malnovajn ideojn pri nia afero. Mi scias, ke iam en Esperanto svarmis la nombro da preĝistoj kaj militistoj, kiuj prenis Esperanton kiel ion sian. **Nenur Mangada estis esperantisto**, sed multaj aliaj armeoficiroj. Bedaŭrinde multaj el ili rifuzis Esperanton kiam

ili vidis, kion oni faras per ĝi en Hispanio. Antaŭ ili Esperanto aperis kiel nesto da maldekstruloj, kiel revolucia lingvo en la politika senco de la vorto. Kaj ili lasis sian originalan ideon perdiĝi. Mi konas pastron, kiu ŝanĝis sian originalan intereson por Esperanto favore al daŭrigado kaj enprofundigado de sia kono pri la latina lingvo.

Jes, mi povus provi defendi miajn ideojn integri ĉiujn en nian ideon. Sed mi jam estas sufiĉe maljuna por ne emi sencelajn batalojn. Eble estos pli facile, ke HEF malaperos, kaj la restantaj geesperantistoj de Hispanio, konstatante, ke ni vere bezonas asocion por disvastigi kaj profundigi nian komunan ideon, kreos alian asocion, provizante regulon por senbalastigi ĝin pri diskriminaciantaj kredoj. Jen la kancero, kiu malaperigos HEFon, se oni ne solvas la problemon. Certe mi ne solvos ĝin.

Alia solvo povas esti, ke tiuj sopirantaj eksHEFanoj rigardos HALEn kiel plej bonan restantan eblecon en esperanta Hispanio, kaj amase venos kaj post ŝanĝo en nia statuto ni ĉiuj prenos la torĉon, kiu laŭŝajne neniu volas porti.

Esperante, kara leganto, ke vi havos alian alrigardon al la problemo **Ĉu HEF devas malaperi**, ĉu ne, kaj ke vi trovos ĝin sufiĉe inda sendi al mi por publikigi ĉi tie kaj instigi novan debaton, mi elkore salutas vin,

Jesuo.



# La Faraono

Ĉapitro 33<sup>a</sup>

Hiram plenumis la promeson. Ĉiutage en la princan palacon en Pi-Bast venis amasoj da sklavoj kaj longaj vicoj da azenoj, portantaj: tritikon, hordeon, sekigitan viandon, teksaĵon kaj vinon. Oron kaj multekostajn ŝtonojn alportis feniciaj komercistoj sub kontrolo de la oficistoj de Hiram.

Tiamaniere en la daŭro de kvin tagoj la princo ricevis la promesitajn cent talentojn. Hiram postulis malgrandan procenton: unu talenton po kvar jare kaj ne postulis garantion, sufiĉis al li princa kvitanco, konfirmita de la tribunalo.

La bezonoj de l' kortego estis malavare provizitaj. Tri amatinoj de l' princo ricevis novajn vestojn, multe da parfumoj kaj po kelke da sklavinoj de diversaj koloroj. La servistoj havis multon da manĝaĵo kaj vino, la reĝa laboristoj ricevis la salajron, la soldatoj —aldonajn porciojn.

La kortego estis ravita, tiom pli, ke Tutmozis kaj aliaj nobelaj junuloj, laŭ ordono de Hiram, ricevis sufiĉe grandajn pruntojn,


kaj la nomarĥo de l' provinco Habu kaj liaj oficistoj ricevis multekostajn donacojn.

Festeno sekvis festenon, amuzajo amuzajo, malgraŭ la senhalte kreskanta varmego. La vicreĝo, vidante la ĝeneralan ĝojon, mem estis kontenta. Ĉagrenis lin nur unu cirkonstanco: la konduto de Mefres kaj de aliaj pastroj. La princo pensis, ke ĉi tiuj altaranguloj riproĉos lin, ke li prenis tiel grandan prunton de Hiram, malgraŭ la admonoj ricevitaj en la templo. Dume la sanktaj pastroj silentis kaj eĉ en montris sin ĉe la kortego.

—Kion tio signifas?, —diris li foje al Tutmozis, ke la pastroj ne riproĉas nin? Tian lukson, kiel nun, ni neniam permesis al ni. La muziko sonas de la mateno ĝis la nokto, kaj ni trinkas de la leviĝo de l' suno, kiel kaj ekdormas kun virinoj en la brakoj aŭ kun kruĉo sub la kapo...

—Kial ili devus fari al ni riproĉojn?—, respondis Tutmozis indigninte.

—Ĉu ni ne vivas en la urbo de Astarte', por kiu la plej agrabla lukto



estas la plezuro, la plej dezirinda ofero la amo? Cetere, la pastroj komprenas, ke post tiel longaj taskoj kaj preĝoj vi bezonas ripozon.

—Ĉu ili diris ion al vi?, demandis kun maltrankvilo la princo.

—Pli ol unu fojon. Hieraŭ, ekzemple, la sankta Mefres diris al mi ridante, ke tiel junan viron, kiel vi, pli allogas la plezuroj ol la diservo aŭ la klopodoj de la regado.

Ramzes ekmeditis. Do la pastroj opinias lin nekonsidera malgraŭ tio, ke dank; al Sara li hodiaŭ, morgaŭ fariĝos patro? Sed tiom pli bone, ili havos surprizon, kiam li ekparolos al ili per sia propra lingvo.

Verdire, la princo mem iom riproĉos sin: de la tago, kiam li forlasis la templon de Hator, li eĉ unu tagon ne okupiĝis per la aferoj de la nomeso Habu. La pastroj povas supozi, ke li estas tute kontenta de la klarigoj de Pentuer, aŭ de la ŝtataj aferoj jam tedis lin.

—Tiom pli bone!—, murmuretis li.  
—Tiom pli bone!

En lia juna animo sub influo de la konstantaj intrigoj aŭ suspektoj pri intrigoj, komencis naskiĝi instinkto de la hipokriteco. Ramzes' sentis ke la pastroj tute ne suspektas, pri kio li parolis kun Hiram kaj kiajn planojn li ŝpinis en sia kapo. Por tiuj ĉi blindigitaj omoj sufiĉis, ke li amuziĝas, kaj ili konkludis, ke la regado restos en iliaj manoj.

—La dioj tiel malklarigis lian prudenton—, diris al si Ramzes'—,

ke ili eĉ ne demandas kial Hiram donis al mi tiel grandan prunton... Eble la ruza feniciano sukcesis dormigi iliajn suspektemajn korojn... Tiom pli bone! Tiom pli bone!

Estis por li stranga plezuro, kiam li pensis ke la pastroj estis trompitaj pri lia konto. Li decidis ankaŭ en la estonta tempo lasi ilin en la eraro, li do amuziĝis kiel frenezuloj.

Efektive la pastroj, precipe Mefres kaj Mentezufis, estis trompitaj pri Ramzes' kaj Hiram. La ruza feniciano ŝajnis antaŭ ili homon tre fieran pro la rilatoj kun la kronprinco, kaj la vic-reĝo kun ne malpli granda sukceso ludis la rolon de diboĉanta junulo.

Mefres eĉ pensis, ke la princo serioze pensas forpeli fenicianojn el Egipto, kaj dume li kaj liaj korteganoj faras ŝuldojn, kiujn ili neniam pagos.

En tiu tempo en la templo de Astarte', en ĝiaj multenombraj ĝardenoj kaj kortoj svarmis amaso da piuloj. Ĉiutage, se ne ĉiuhore, el la mezo de Azio, malgraŭ la terura varmego, venis al la granda diino iu pilgrimaro.

Tio estis strangaj pilgrimoj. Lacaj, kovritaj de polvo, ili iris kun muziko, dancante kaj kantante iafoje tre malĉastajn kantojn. La tagoj pasadis por ili en senhontaj diboĉoj por la honoro de la diino Astarte'.

Ĉiun tian anaron oni povis ne sole ekvidi, sed eĉ senti de malprok-

sime, ĉar ili portis grandegajn bukedojn de freŝaj floroj en la manoj kaj en sakoj katojn mortintajn du la jaro.

La katojn la piuloj donis al la paraŝitoj por balzamado aŭ pajloŝtopado, kaj poste ili reportis ilin hejmen, kiel respektitajn sanktajn restaĵojn.

En la komenco de la monato Misori (majo, junio) la princo sciigis al Hiram, ke en la vespero de la sama tago li povas veni en la fenician templon de Astoret'. Kiam post la subiro de l' suno fariĝis mallume en la stratoj la vic-reĝo alliginte mallongan glavon al la flanko, surmetis mantelon kun kapuĉo kaj ne rimarkita de iu servisto elglitis por iri en la domon de Hiram.

La maljuna riĉulo atendis lin.

—Do—, diris li kun rideto, —via ekscelenco ne timas eniri en fenician templon, kie sur la altaro sidas la krueleco, servata de la ruzo?

—Ĉu Timi?—, demandis Ramzes', rigardante lin preskaŭ kun malestimo. —Astoret' ne estas Baal, nek mi infano kiun oni povas ĵeti en la brulantan ventron de via dio.

—Kaj vi, princo, kredas tion?

Ramzes' levis la ŝultron.

—Respektinda kaj konfidinda atestanto—, respondis li, —rakontis al mi pri viaj oferoj el infanoj. Foje ventego rompita al vi dekkelkon da ŝipoj. Tuj la tiraj pastroj anoncis diservon, al kiu iris granda popolamaso...

La princo parolis kun videbla indigno.

—Antaŭ la templo de Baal, sur altaĵo, sidis grandega bronza statuo kun bova kapo. Ĝia ventro estis hejtita ĝis ruĝe. Tiam, laŭ ordono de viaj pastroj, la malsaĝaj feniciaj patrinoj komencis meti plej belajn infanojn ĉe la piedoj de la kruela dio.

—Nur knabojn—, intermetis Hiram.

—Jes, nur knabojn—, ripetis la princo. —La pastroj superverŝis ĉiun infanon per parfumoj, kaj tiam la statuo kaptis ilin per siaj bronzaĵoj, malfermis la buŝegon kaj englutis la infanon, malespere kiantan. Ĉiufoje el la buŝo de l' dio eliĝis flamoj.

Hiram mallaŭte ridis.

—Kaj via ekscelenco kredas tion?

—Tion rakontis al mi homo, mi ripetas, kiu neniam mensogas.

—Li diris, kion efektive li vidis—, respondis Hiram. —Sed ĉu ne mirigis lin, ke neniu patrino, kies infanojn oni bruligis, ploris?

—Vere li miris pro la indiferenteco de l' virinoj, ĉiam pretaj verŝi larmojn eĉ super mortinta kokino. Tio pruvas grandan kruelecon de via popolo.

La maljuna feniciano balancis la kapon.

—Kiam tio okazis?—, demandis li.

—Antaŭ kelke da jaroj.

—Bone—, malrapide parolis Hiram, —Se via ekscelenco volos iam viziti Tiron, mi havos la honoron montri al vi tian solenon.

—Mi ne deziras ĝin vidi!

—Poste ni iros en alian korton de l'



templo, kie vi vidos tre belan lernejon, kaj en ĝi sanajn kaj gajajn la samajn knabojn, kiujn oni *bruligis* antaŭ kelke da jaroj.

—Kiel?—, ekkriis Ramzes', ĉu ili ne pereis?

—Ili vivas kaj kreskas por fariĝi bravaj maristoj. Kiam via ekscelenco fariĝos sankteco (vi vivu eterne!) eble pli ol unu el ili direktos viajn ŝipojn.

—Vi do trompas vian popolon?—, ridis la princo.

—Ni trompas neniun—, respondis serioze la feniciano. —Ĉiu trompas sin mem, se li ne petas klarigojn pri la soleno, kiun li ne komprenas.

—Mi volus scii...—, diris Ramzes'.

—Efektive—, daŭrigis Hiram—, ekzistas ĉe ni moro, ke la malriĉaj patrinoj, por certigi feliĉan sorton al siaj filoj, oferas ilin al la ŝtato. La infanoj estas kaptataj de la statuo de Baal, en kiu estas brulanta forno. Ĉi tiu ceremonio ne signifas, ke la infanoj vere estas bruligataj, sed ke ili fariĝis propraj de la templo kaj pereis por la patrinoj, kvazaŭ falinte en fajron.

«En la realeco ili ne iras en firon, sed al nutristinoj kaj vartistinoj, kiuj edukas ilin dum kelke da jaroj. Kiam ili pligrandiĝas, prenas ilin kaj instruas la pastra lernejo de Baal. La plej kapablaj fariĝas pastroj aŭ oficistoj; la malpli inteligentaj, maristoj kaj ofte akiras grandajn riĉaĵojn.

Nun vi, princo, ne miros plu, ke niaj patrinoj ne ploras siajn infanojn. Mi diros pli: nun vi komprenos, kial en niaj leĝoj ne ekzistas punoj por la

gepatroj, kiuj mortigas siajn idojn, kiel en Egipto.

—Ĉie oni trovas krimulojn—, intermetis la vic-reĝo

—Sed ĉe ni ne ekzistas idomortigantoj, —daŭrigis Hiram. —Ĉar ĉe ni pri la infanoj, kiujn ne povas nutri iliaj patrinoj, zorgas la ŝtato kaj la temploj.

La princo ekmeditis subite li ĉirkaŭprenis Hiramon kaj ekkriis kortuŝita:

—Vi estas multe pli bonaj ol tiuj, kiuj rakontas pri vi tiel terurajn historiojn. Mi tre ĝojas pro tio.

—Ankaŭ en ni estas ne malmulte da malbono—, respondis Hiram, —sed ni ĉiuj estos viaj fidelaj servistoj, sinjoro, kiam vi alvokos nin.

—Vere?—, demandis la princo, penetre rigardante liajn okulojn.

La maljunulo metis la manon sur la koron.

—Mi ĵuras al vi, egipta kronprinco kaj estonta faraono, ke se iam vi komencos batalon kontraŭ niaj komunaj malamikoj, la tuta Fenicio kvazaŭ unu viro alkuros por helpi vin.

«Kaj jen ĉi tion prenu, kiel memoraĵon de nia hodiaŭa interparolado.

Li eltiris el sub la vesto oran medalon, kovritan de misteraj signoj kaj, murmurante preĝojn, pendigis ĝin sur la kolon de Ramzes'.

—Kun tiu ĉi amuleto—, diris Hiram, —vi povas trakuri la tutan mondon, kaj kie ajn vi renkontos fenicianon, li servos al vi per sia konsilo, oro, eĉ glavo. Kaj nun, ni iru.

Pasis jam kelke da horoj post la

subiro de l' suno, sed la nokto estis luma, ĉar leviĝis la luno. La terura taga varmego cedis al la malvarmeto, en la pura aero ne estis plu la griza polvo, kiu tage venenis la spiradon kaj pikis la okulojn. Sur la blua ĉielo tie ĉi kaj tie brilis la steloj, kies lumo disfluis en la radioj de la luno.

En la stratoj ĉesis la movado sed la tegmentoj de ĉiuj domoj estis plenaj de amuziĝantaj homoj. Ŝajnis, ke Pi-Bast estas unu salono plenigita per muziko, kanto, rido kaj sonoj de pokaloj.

La princo kaj feniciano iris rapide, ekster la urbon, elekante malpli lumigitajn stratojn. Malgraŭ tio, la homoj festenantaj sur la terasoj iafoje rimarkis ilin kaj invitis aŭ ŝutis florojn sur iliajn kapojn.

—Noktaj vaguloj!—, oni kriis el la tegmentoj. —Se vi ne estas ŝtelistoj, kiujn la nokto allogas al ĉaso, veni al ni. Ni havas bonan vinon kaj gajajn virinojn.

La du vojaĝantoj ne respondis la afablajn invitojn, rapidante al la celo. Fine ili eniris en parton de l' urbo, kie estis malpli da domoj kaj pli da ĝardenoj, kies arboj dank' al la malseka blovo de l' maro kreskis pli altaj kaj branĉoriĉaj ol en la sudaj provincoj de Egipto.

—Jam ne malproksime—, diris Hiram.

La princo levis la okulojn kaj super la densa verdaĵo de l' arboj ekvidis kvadratan turon de blua koloro, kaj sur ĝi blankan, malpli grandan. Tio estis la templo de Astarte'. Baldaŭ ili eniris en la mezon de l' ĝardeno, de

kie oni povis ĉirkaŭpreni per la rigardo la tutan konstruaĵon.

Ĝi konsistis el kelke da etaĝoj. La unuan formis kvadrata teraso 400 paŝojn longa, kiu kuŝis sur muro kelke da metroj alta, nigre kolorigita. Ĉe la orienta flanko estis perono, al kiu kondukis du larĝaj ŝtuparoj. Ĉe la aliaj flankoj staris turetoj, dek ĉe ĉiu; inter ĉiuj du turetoj estis kvin



fenestroj.

Proksimume en la mezo de la teraso leviĝis konstruaĵo ankaŭ kvadrata, kies flankoj estis ducent paŝoj longajn. Ĝi havis nur unu ŝtuparon, turojn ĉe la anguloj kaj estis de purpura koloro.

Sur la plata tegmento de ĉi tiu konstruaĵo staris denove kvadrata teraso, kelke da metroj alta, de ora koloro, kaj sur ĝi unu sur la alia, du turoj: blua kaj blanka.

La tuto havis tian aspekton, kvazaŭ iu metis sur la tero grandan nigran ĵetkubon, sur ĝi malpli grandan purpuran, sur ĝi oran, pli alte bluan kaj plej alte arĝentan. Al ĉiuj el tiuj etaĝoj kondukis ŝtuparoj, aŭ flankaj

duoblaj, aŭ frontaj simplaj, ĉiam ĉe orienta flanko.

Apud la ŝtuparoj kaj pordoj staris alterne grandaj egiptaj sfinksoj, aŭ asiriaj flugilaj bovoj kun homaj kapoj.

La vic-reĝo kun plezuro rigardis la konstruaĵon, kiu en la lumo de la luno, sur la fono de la folioričaj kreskaĵoj havis ĉarman aspekton. Ĝi estis konstruita en la stilo ĥaldea kaj tute diferencis de la egiptaj temploj, unue per la sistemo de l' etaĝoj, due per la vetikalaj muroj. Ĉe egiptanoj ĉiu grava konstruaĵo havis deklivajn murojn, kvazaŭ kuniĝantajn supren.

La ĝardeno ne estis malplena. En diversaj punktoj oni vidis malgrandajn domojn kaj palacojn, brilis lumoj, sonis kantoj kaj muziko. Inter la arboj, de tempo al tempo glitis ombro de ama paro.

Subite proksimiĝis al ili maljuna pastro; li interparolis kelke da vortoj kun Hiram kaj profunde sin klininte antaŭ la princo diris:

—Bonvolu, sinjoro, sekvi min.

—Kaj la dioj gardu vian ekscelencon—, aldonis Hiram forlasante ilin.

Ramzes' iris post la pastro. Iom flanke de la templo, en la plej granda densaĵo staris ŝtona benko, kaj cent paŝojn de ĝi malgranda palaco, apud kiu sonis kantoj.

—Ĉu tie oni preĝas?—, demandis la princo.

—Ne!—, respondis la pastro, ne kaŝante sian abomenon. —Tie ni kolektiĝas la adorantoj de Kama, nia pastrino, kiu gardas la fajron antaŭ la

altaro de Astoret.

—Kiun ŝi akceptos hodiaŭ?

—Neniun, neniam!—, respondis la gvidanto kun indigno. —Se pastrino de la fajro rompus la ĵurpromeson de l' ĉasteco, ŝi devus morti.

—Kruela leĝo!—, diris la princo.

—Bonvolu, sinjoro, atendi sur ĉi tiu benko—, diris malvarme la fenicia pastro. —Kaj kiam vi ekaŭdos tri batojn en la bronzajn ladojn, suriru la terason kaj de tie la purpuran konstruaĵon.

—Ĉu sola?

—Jes.

La princo sidiĝis sur la benkon, en la ombro de olivarbo, kaj aŭskultis la virinajn ridojn, sonantajn en la palaco.

"Kama?", pensis li. "Bela nomo! Ŝi devas esti juna, eble bela, kaj tiuj ĉi malsaĝaj fenicianoj minacas ŝin per la morto, se... Ĉu tiel ili volas certigi al si almenaŭ dekkelkon da virgulinaj en la tuta lando?"

Li ridis, sed li estis malĝoja. Oni ne scias kial li kompatis ĉi tiun nekonatan virinon, por kiu la amo estis la pordo en la tombon.

—Mi imagas Tutmozison, se oni nomus lin pastrino de Astoret! Kompatinda, li devus morti, antaŭ kiam unu lampo forbrulus antaŭ la diino.

En la sama momento antaŭ la palaco eksonis fluto kaj ludis melankolian melodion, kiun akompanis voĉoj de kantantaj virinoj.

—Ahaa! Ahaa!—, kantis la virinoj,

kvazaŭ lulante infanon.

Eksilentis la fluto, ĉesis kanti la virinoj, kaj eksonis bela vira voĉo greke:

—Kiam sur la balkono ekbrilas via vesto, paliĝas la steloj kaj eksilentas la najtingaloj, kaj en mia koro naskiĝas tia silento, kiel sur la tero, kiam salutas lin la blanka aŭroro.

—Ahaa! Ahaa!—, kantetis la virinoj, la fluto ree ludis unu strofon.

—Kaj kiam dronante en via preĝo, vi iras al la templo, la violoj ĉirkaŭas vin per bonodora nubo, la papilioj flirtas apud via buŝo, la palmoj klinas siajn kapojn antaŭ via beleco.

—Ahaa! Ahaa! Ahaa! Ahaa!

—Kiam mi ne vidas vin, mi rigardas la ĉielon por rememori la dolĉan trankvilon de via vizaĝo. Vana peno! La ĉielo ne havas vian serenon, kaj ĝia varmego estas frosto kompare kun la flamoj, kiuj cindrigis mian koron.

—Ahaa! Ahaa!

—Foje mi haltis inter la rozoj, kiujn la brilo de viaj rigardoj vestas per skarlato, blanko kaj oro. Ĉiu ilia folio rememorigis al mi unu horon, ĉiu floro unu monaton, pasigitan ĉe viaj piedoj, kaj la gutoj de la rozo... Ili estas miaj larmoj, per kiuj sin nutras la terura vento de l' dezerto. Faru signon, kaj mi kaptos vin kaj forportos en mian karan patrujon. La maro apartigos nin de la persekutantoj, mirtaj arbetaroj kaŝos siajn karesojn, kaj dioj, pli favoraj por la amantoj gardos nian feliĉon.

Ramzes' fermetis la okulojn kaj songis. Tra la mallevitaj okulharoj li ne vidis plu la ĝardenon, sed sole la riveron de la luna lumo, en kiu disfluis nigraj ombroj kaj la kanto de la nekonata homo al la nekonata virino. Dum momentoj la kanto tiel ĉirkaŭis lin, tiel profunde penetris en lian animon, ke Ramzes' volis demandi: ĉu ne li mem estas ĉi tiu ama kanto?

En tiu momento lia rango, povo kaj malfacilaj ŝtataj demandoj, ĉio ŝajnis al li mizera bagatelo kompare kun ĉi tiu luna nokto kaj tiuj ĉi ekkrioj de la amanta koro. Se oni proponus al li elekti: la tutan faraonan potencon aŭ lian nunan staton de sia animo, li preferus la revadon, en kiu malaperis la tuta mondo, li mem, eĉ la tempo, kaj restis nur dolĉa sopiro, rapidanta al la eterneco, sur la flugiloj de l' kanto.

Subite la princo vekigis, la kanto eksilentis, en la palaco estingiĝis la lumoj, kaj ĝiajn blankajn murojn forte kontrastis la nigraj, malplenaj fenestroj. Oni povis pensi, ke tie neniu iam loĝis. Eĉ la ĝardeno malpleniĝis kaj eksilentis, eĉ la malpeza venteto ĉesis movi la foliojn.

Unu! Du! Tri! El la templo alflugis tri potencaj bronzaĵoj.

"Jes! Mi devas iri tien", pensis la princo, ne sciante bone kien kaj por kio.

Li direktis sin, tamen, al la templo, kies arĝenta turo superstaris la arbojn, kvazaŭ alvokante lin al si.

Li iris duonebria, plena de strangaj deziroj. Malvaste ŝajnis al li inter la



arboj, li deziris suriri la supron de l' turo, libere ekspiri kaj ĉirkaŭpreni per la rigardo pli vastan horizonton. Poste rememorante, ke estas nun la monato Misor, ke jam pasis unu jaro de la manovroj en la dezerto, li eksentis sopiron al ĝi. Kiel volonte li sidiĝus en sian malpezan ĉaron duĉevalan, kaj galopus ien antaŭen, kie ne estus tiel sufoko, kie la arboj ne kovrus la horizonton!

Li jam estis ĉe la piedoj de l' templo, li do suriris la terason. Silente kaj malplene, kvazaŭ en tombo; nur de malproksime murmuretis la akvo de fontano. Sur la dua ŝtuparo li forĵetis siajn mantelon kaj glavon, ankaŭ unu fojon ekrigardis la ĝardenon kvazaŭ por adiaŭi la lunon, kaj eniris en la templon. Super li leviĝis ankoraŭ tri etaĝoj.

La bronza pordo estis malfermita, ĉe ambaŭ flakoj de la eniro staris flugilaj figuroj de homoj kun novaj kapoj, sur kies vizaĝoj regis fiera trankvilo.

—Jen la asiriaj reĝoj—, pensis la princo, rigardante iliajn barbojn, plektitajn en malgrandajn harligojn.

La interno de la templo estis nigra, kiel la plej nigra nokto. En la mallumon penetris nur blankaj strioj de la luna lumo, eniranta tra mallarĝaj, sed altaj fenestroj.

En la mezo brulis du lampoj, antaŭ la statuo de la diino Astarte' la stranga lumigo de supre faris la statuon perfekte videbla. Ramzes' rigardis. Tio estis grandega virino kun strutaj flugiloj. Ŝi portis longan veston kun faldoj, sur la kapo pintan ĉapon, en la dekstra mano paron da kolomboj. Ŝia

bela vizaĝo kaj mallevitaj okuloj havis esprimon de tia dolĉeco, de tia ĉasteco, ke mirego ekregis la princon: ŝi ja estis patronino de la venĝo kaj plej senhonta malĉasteco.

Fenicio montris al li ankoraŭ unu el siaj misteroj.

«Stranga nacio», pensis li. «Iliaj homglutantaj dioj manĝas neniun, kaj ilian malĉastecon protektas virgaj pastrinoj kaj diinoj kun infana vizaĝo...»

Subite li eksilentis, ke sur liaj piedoj traglitis io, kvazaŭ granda serpento. Ramzes' posteniĝis kaj haltis en la strio de la luna lumo.

—Senteraro!—, diris li al si.

Preskaŭ en la sama momento li ekaŭdis murmureton:

—Ramzes'! Ramzes'!

Neeble estis ekkoni la voĉon: ĉu ĝi estis vira aŭ virina, kaj de kie ĝi venas?

—Ramzes'! Ramzes'!—, eksonis murmureto, kvazaŭ de la planko.

La princo eniris en nelumigitan lokon kaj aŭskultante klinis sin.

Subite li eksentis sur sia kapo du delikatajn manojn.

Li saltis por kapti ilin, sed li renkontis nur la aeron.

—Ramzes'!—, murmuretis oni de supre.

Li levis la kapon kaj eksentis sur la buŝo lotusan floron. Kiam li etendis al ĝi la manojn, iu delikate sin apogis sur liajn ŝultrojn.

—Ramzes'!—, kriis oni de la altaro.

La princo sin turnis posten kaj ŝtoniĝis. Kelke da paŝoj de li, en la luma strio staris belega homo, tute simila al li. La samaj okuloj, vizaĝo, junula barbo, la sama kresko, movoj kaj vestoj.

Unu momenton la princo pensis, ke li staras antaŭ la grandega spegulo, kian ne posedis eĉ la faraono. Sed tuj li konvinkiĝis, ke lia samulo ne estas bildo, sed vivanta homo.

En ĉi tiu momento li eksentis kison sur la kolo. Li ree sin turnis, sed estis neniŭ, kaj dume sia samulo malaperis.

—Kiu estas ĉi tie? Mi volas scii!—, diris kolere la princo.

—Mi..., Kama—, respondis dolĉa voĉo.

En la luma strio aperis belega virino": nuda, kun ora zono ĉirkaŭ la koksoj.

Ramzes' ekkuris kaj kaptis ŝin je la mano. Ŝi ne forkuris.

—Vi estas Kama? Ne, vi estas... Jes, vin iam sendis Dagon, sed via nomo estis tiam Kareso.

—Ĉar mi estas ankaŭ Kareso—, respondis ŝi naive.

—Ĉu vi tuŝis min per la manoj?

—Mi.

—Kiel?

—Jen tiel—, respondis ŝi, ĵetante siajn brakojn ĉirkaŭ lian kolon kaj kisante lin.

Ramzes' kaptis ŝin per la brakoj, sed ŝi elŝiris sin kun tia forto, kian oni ne povus supozi en tiel delikata estaĵo.



—Do ĉu vi estas la pastrino Kama? Al vi kantis hodiaŭ la greko?—, diris la princo, pasie premante ŝiajn manojn.

—Kiu li estas, ĉi tiu kantisto?

Kama malestime levis la ŝultrojn.

—Li estas en nia templo.

La okuloj de Ramzes' brilis. plilarĝiĝis liaj naztruoj, li sentis zumadon en la kapo. La sama virino antaŭ kelke da monatoj faris je li malgrandan impreson, sed hodiaŭ li esti preta fari por ŝi frenezaĵon. Li enviis al la greko, kaj samtempe sentis nepriskribeblan doloron ĉe la penso, ke se ŝi fariĝus lia amatino, ŝi devus morti.

—Sed kiel bela vi estas!—, diris li. —Kie vi loĝas? Ah, jes, mi scias, ne tiu palaceto. Ĉu oni povas viziti vin? Kompreneble, se vi akceptas vizitojn de kantistoj, vi povas ankaŭ min akcepti. Ĉu vere vi estas pastrino, gardanta la fajron?

—Jes.

—Kaj viaj leĝoj estas tiel kruelaj, ke ili ne permesas al vi ami? He, tio estas

nur vanaj minacoj! Por mi vi faros escepton.

—La tuta Fenicio malbenus min, la dioj sin venĝus—, respondis ŝi kun rido.

Ramzes' ree altiris ŝin al si, ŝi ree elŝiris sin.

—Gardu vin, princo—, diris ŝi kun provokanta rigardo. —Fenicio estas potenca, kaj ĝiaj dioj...

—Indiferentaj estas por mi viaj dioj kaj Fenicio! Se unu haro falus de via kapo, mi piedpremus Fenicion, kiel venenan serpenton.

—Kama! Kama!—, eksonis voĉo, venanta de la statuo.

Ŝi ektimis.

—Jen vi aŭdas, ili vokas min. Eble ili eĉ aŭdis viajn blasfemojn.

—Ili ne ekaŭdu mian koleron!—, eskplodis la princo.

—La kolero de la dioj estas pli terura.

Ŝi elŝiris sin kaj malaperis en la ombroj de la templo. Ramzes' sin ĵetis post ŝi, sed subite li haltis. La tutan templon, inter la altaro kaj li, plenigis grandega fajra flamo, en kiu komencis sin montri monstraj figuroj: grandegaj vespertoj, rampaĵoj kun homaj vizaĝoj, ombroj...

La flamo iris rekte al ili tra la tuta larĝo de la konstruaĵo. Konsternita de la terura spektaklo, la princo posteniĝis. Freŝa aero envolvis lin. Li turnis la kapon..., li estis jam eskter la templo, kaj samtempe la bronza pordego kun bruo fermiĝis post li.

Li frotis la okulojn kaj rigardis ĉirkaŭe. La luno de la plej alta punkto sur la ĉielo malleviĝis jam al la

okcidento. Apud kolono Ramzes' trovis siajn glavon kaj mantelon. Li levis ilin kaj malsupreniris kiel ebria.

Kiam li malfrue revenis en la palacon Tutmozis, vidante lian palan vizaĝon kaj malklaran rigardon, ekkriis kur timo:

—Pro dioj! Kie vi estis erpatre? La tuta kortego ne povas dormi de maltrankvilo.

—Mi rigardis la urbon. Bela nokto.

—Ĉu vi scias—, diris rapide Tutmozis kvazaŭ timante, ke iu ne faru tion pli frue—, Sara naskis al vi filon.

—Ĉu vere? Mi volas, ke neniu maltrankviliĝu, kiam mi promenas.

—Ĉu sola?

—Se mi ne povus iri sola, kie plaĉas al mi, mi estus la plej malfeliĉa sklavo en ĉi tiu rego—, respondis maldolĉe la viĉ-rego.

Li transdonis la glavon kaj mantelon al Tutmozis kaj iris en sian dormoĉambron, alvokante neniun. Hieraŭ li novaĵo pri la naskiĝo de filo plenigus lin per ĝojo, sed hodiaŭ li akceptis ĝin indifere. Tuta lia animo estis plena de la rememoroj pri la hodiaŭa vespero plej stranga kiun li iam travivis.

Li vidis ankoraŭ la lumon de la luno en la oreloj sonis la kanto de la greko Kaj ĉi tiu templo de Astarte'!

Li ne povis ekdormi ĝis la mateno.

### *Finas ĉapitro 33-a*





# Kajeroj el la Sudo

Bulteno de Hispana Asocio  
de Laboristoj Esperantistaj



<http://www.gazetotekolanti.com/hale/k87.pdf>

## Enhavo

Redaktore.....	2
Parolas la Prezidanto.....	3
Amiko Alfredo.....	4
Al Marjano, kun inklino..	8
Vivu la Respubliko!.....	9
Kien iras HEF?.....	12
La Faraono, ĉ33 <sup>a</sup> .....	14

**Kovilo:** Sinjoro Alfredo Pérez Rubalcaba ja petis al ni, ke ni nomu lin Alfredo, ĉar li volas esti atingebla de la popolo. Lia moto por ĉi tiu balotado estas Li scias, li respondas, kvankam dum preskaŭ okdek jaroj li estis ministro, kiu nek sciis, nek respondis. Espereble la venonta prezidanto de Hispanio, ĉu li, ĉu alia, kaj scios kaj respondos al kaj pri la gravaj problemoj, kiujn la averaĝa hispano devas alfronti ĉiun tagon, kiuj certe estas nek ideologiaj nek naciismaj, sed privaloraj kaj monaj.

## Cabezos.

Redaktas: Jesuo de las Heras.

Korektas: Jozefo Pina.

Retskribu al: [kajeroj@gmail.com](mailto:kajeroj@gmail.com)

Oni povas reprodukti la enhavon, kondiĉe, ke oni citu la originon.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoro, ne la redakcio.

Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj, kvankam ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo ne mistraktu personon.

Nova konto La Caixa:

2100 4617 41 2200115275

Tute verkita kaj kompilita per  
senpagaj linuksaj rimedoj:

OpenOffice Writer, Gimp kaj

Depósito legal: Z-2398-88. Presejo: Copygraph Scribus.

ISSN 1697-6460